

La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-14

n-ro 416

Paraplegiulo sukcesis je montgrimpado sur rulseĝo



Eldiro de TRUMP estas
kondamnita

Knaboj lernas pli bone en
la akompano de knabinoj

Sirio: novaj mortigaj
sturmatakoj en la
orienta Ĥuto

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Farita per:



Scribus
Open Source Desktop Publishing

Eldiro de TRUMP estas kondamnita
"Ŝoka", "hontinda" kaj "rasisma" p. 03

Sirio: novaj mortigaj sturmatakoj en la orienta Ĥuto

Almenaŭ 17 civiluloj estis mortigitaj p. 03

Paraplegiulo sukcesis je montgrimpado sur rulseĝo

LAI Chi-wai p. 04

Knaboj lernas pli bone en la akompano de knabinoj

Tio aparte rilatas al ilia kapablo legi p. 04

Kial virinoj atingas pli altan aĝon ol viroj

Sociaj faktoroj tamen ludas gravan flankan rolon p. 05

Yahya Kemal BEYATLI kaj lia poemo "Kvieta Ŝipo"

Unu el la plej gravaj turkaj poetoj p. 06

Eldiro de TRUMP estas kondamnita

La 12-an de januaro Rupert COLVILLE, proparolanto de la oficejo de Alta Komisararo de UN pri Homaj Rajtoj, en gazetara konferenco diris, ke la plej nova eldiro de Usona Prezidento Donald TRUMP pri afrikaj migrintoj estas "ŝoka", "hontinda" kaj "rasisma".



Laŭ raporto, la 11-an de januaro, kiam TRUMP partoprenis en konsiliĝa kunveno, li diris, kial Usono akceptas tiom da

migrintoj el "rubaj landoj" kiel Haitio kaj afrikaj landoj, sed ne el tia lando kia Norvegio?

COLVILLE kondamnis TRUMP, ke li uzis makulajn vortojn kiel "rubaj landoj" celante al afrikaj landoj. COLVILLE emfazis, ke tiu eldiro de TRUMP ne estas simpla demando pri uzo de krudaj vortoj, sed ĝi reflektas tion, ke la politiko de Usono nun malfermas malbelecon de la homa naturo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Sirio: novaj mortigaj sturmatakoj en la orienta Ĥuto

En Sirio, almenaŭ 17 civiluloj estis mortigitaj sabaton la 6-an de januaro en novaj aeraj sturmatakoj de la reĝimo kaj de ties rusa aliancano en la Orienta Ĥuto. Tiu ribela enklavo apud Damasko estas sieĝata kaj amase bombardata tiujn pasintajn tagojn. La informo devenas de la Siria observejo de la homaj rajtoj (SOHR), NRO bazita en Britio.

La plej mortigaj frapoj okazis en la urbo *Hamurīa*, laŭ la SOHR. Infanoj figuras inter la viktimoj. Surloka korespondanto de Franca Novaĵagentejo raportas imponajn damaĝojn:



detrinitajn konstruaĵojn, faŭkantajn fasadojn kaj stratojn kovritajn per ruinaĵoj.

La regiono de la Orienta Ĥuto, apud Damasko, estas senĉese bombardata de pluraj tagoj fare de la siriaj fortoj kaj de ties rusa aliancano. Ili provas delokigi ribelajn kaj ĝihadistajn grupojn, kiuj sieĝas militbazojn de la reĝimo. Sed tio fariĝas je la prezo de multaj civilaj viktimoj.

Jam merkredon la 3-an de januaro, trideko da personoj mortis en bombardoj. La humanitaraj organizaĵoj denuncas sendistingajn frapojn, kiuj atingas interalie malsanulejojn. Ĉirkaŭ 400 000 sirianoj loĝas en la Orienta Ĥuto. Krom la militaj perfortoj, ili suferas pri gravaj mankoj de nutraĵoj kaj medikamentoj.

Neniam Milito Inter Ni

Paraplegiulo sukcesis je montgrimpado sur rulseĝo

LAI Chi-wai, 35-jaraĝa, estas la unua ĉina atleto indikita al la premio *Laureus World Sports Awards*, post lia faro efektivigita decembre 2017: sidante sur rulseĝo li grimpis la monton *Lion Rock* en Honkongo, 495 metrojn alta.

Li estas kvarfoja ĉampiono pri Azia Turniro de Grimpado, kaj la unua ĉina venkinto de la sporta turniro “X-*Games*”, sed lia brila kariero estis finita pro



aŭtomobila akcidento, kiu en la jaro 2011 paralizigis liajn malsuprajn membrojn.

“Por mi supreniri la monton koncernis plenumon de revo, krom pruvi al miaj amikoj kaj ŝatantoj, ke mi superis tiajn plej malfacilajn momentojn de mia vivo. Eĉ sur rulseĝo mi kapablas defii aliajn sportojn krom fari tion, kion mi pleje amas”, tion LAI Chi-wai diris al la novaĵagentejo *Reuters*.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

Knaboj lernas pli bone en la akompano de knabinoj

En lernejoj, en kiuj signifan elcenton de lernantoj konsistigas knabinoj, knaboj atingas pli bonajn lernorezultojn. Tio aparte rilatas al ilia kapablo legi. Informis pri tio la periodaĵo „*School Effectiveness and School Improvement*”.

En la ekzamenado efektivigita i.a. de nederlandaj sciencistoj el la universitato en *Utrecht* partoprenis 200 mil 15-jaraĝuloj en la tuta mondo. Ili estis subigitaj al testo, kiu ekzamenis ilian legokapablon. Evidentiĝis, ke knaboj el lernejoj, en kiuj pli ol 60 procentojn de lernantoj konsistigas knabinoj



estis akirantaj pli bonajn lernorezultojn.

La antaŭaj ekzamenadoj sugestis, ke knaboj forte reagas je lernokondiĉoj. La ĝenerala lernoetoso aŭ pigrostimula atmosfero povas signife influi ilian rilaton al lernado. Pro la fakto, ke knabinojn karakterizas kutime bona koncentriĝo kaj ilia sukcesaspiro estas alte motivita, ilia ĉeesto povas pozitive influi kolegojn. Kiel asertas d-ino Margriet VAN HEK la problemo de malalta legokapablo de knaboj estas vaste konata, sed ne sufiĉe esplorita. La nunaj esploroj elmontris, ke tiu problemo intensiĝas, kiam lernantoj frekventas lernejojn, en kiuj dominas knaboj.

Pola Retradio

Kial virinoj atingas pli altan aĝon ol viroj

Virinoj jam de ĉiam vivis pli longe ol viroj, eĉ dum periodoj de malsatego kaj de krizoj. Supozeble ĉe la atingebla aĝo virinoj denature antaŭas la virojn - sociaj faktoroj tamen ludas gravan flankan rolon.

Virino kiu hodiaŭ naskiĝis en Aŭstrio povas kalkuli pri 84 vivojaroj, viro pri 79 jaroj. Rilate al atingebla vivodaŭro la virinoj en plej multaj landoj antaŭas la virojn, eĉ se tiu diferenco denove iomete malkreskas je kelkaj jaroj. La vira malavantaĝo estas almenaŭ parte sekvo de la vivostilo: Streso, alkoholo, nikotino kaj riska konduto portas virojn foje pli rapide al tombo.

Tamen estas kelkaj indikoj ke virinoj - eĉ ĉe identa vivokonduto - vivos iom pli longe ol viroj. Unuflanke virinoj en relative homogenaj komunumoj kiel ekzemple en monahinejoj same fariĝas pli aĝaj. Krome eĉ ĉe novnaskitoj mortas pli da viraj beboj - diferencoj en konduto je tiu momento ne povas ankoraŭ efiki.

Sed kio okazas sub ekstremaj vivocirkonstancoj, ekzemple dum periodo de malsatego? Ĉu ankaŭ tiam virinoj havas ankoraŭ la pli bonajn kartojn? Tiujn demandojn pritraktis esploristoj de la universitato de suda Danlando en aktuala studaĵo. Se la virina sekso vivas pli longe eĉ dum tiaj krizaj periodoj, tiam virinoj supozeble vere havas denaturan avantaĝon, diras la aŭtoroj de la studaĵo.

La kuntekston ili analizis helpe de historiaj datumoj pri krizaj situacioj en diversaj popolgrupoj: Pri sklavoj en Trinidado dum la 19-a jarcento, pri liberigitaj sklavoj kiuj inter la jaroj 1820 kaj 1843 revenis al Liberio kaj kiuj tie devis lukti kontraŭ neimageblaj

malfacilaĵoj kiel ekzemple gravaj malsanoj.

Preskaŭ duono mortis dum la unua jaro post ilia reveno.

Pluaj datumaroj devenis de malsatega periodo en Ukrainio dum la jaro 1933, de du epidemioj de morbilo en Islando dum la 19-a jarcento kaj de la granda

malsatego en Irlando (de 1845 ĝis 1849) kiu estas kaŭzita de putriĝo de terpomoj.

Fakte la virinoj en ĉiuj popolgrupoj ankaŭ dum krizaj periodoj averaĝe vivis pli longe ol la viroj, eĉ se la atingebla vivodaŭro signife malkreskis kaj la antaŭeco de la virinoj kompare al la tempo antaŭ kaj post la krizo ne plu estis tiel alta. Nur ĉe la sklavoj en Trinidado la morteco ĉe junaj virinoj estis iom pli alta. Sed por tio povus troviĝi alia ekspliko. Junaj viraj sklavoj estis aparte valoraj por siaj posedantoj, do oni investis ankaŭ pli por ilia transvivado.

La morteco de infanoj kaj beboj en ĉiuj datumaroj havis la plej grandan influon al la priseksaj diferencoj kiel tion montris la detala analizo. Tio signifas ke virinaj beboj transvivis mizeran situacion ĉie signife pli ofte ol iliaj viraj samaĝuloj. Krome ekstreme altaĝaj homoj en ĉiuj grupoj estis plej ofte virinoj.

Por la biologia avantaĝo de virinoj estas pluraj eksplikoj. Kelkaj esploristoj supozas

ke la dua X-kromosomo kaŭzas pli longan vivon. Sed ankaŭ hormonaj diferencoj povus ludi sian rolon. La virina sekshormono estrogeno ekzemple eble plifortigas la imunrezistivon, dum aliflanke testosterono malfortigas ĝin.

Tamen la biologio povas ekspliki maksimume nur parton de la hodiaŭaj diferencoj ĉe la atingebla vivodaŭro, la resto ŝuldiĝas al la vivocirkonstancoj, kiel tion akcentas la aŭtoroj de la studaĵo. Tiel ekzemple virinoj en malriĉaj landoj ne vivos tiom pli longe ol viroj, ĉar la morteco de

patrinoj tie estas tre alta.

Plej granda estas la distanco inter la seksoj hodiaŭ en riĉaj okcidentaj industriaj nacioj, nur dum la pasintaj jardekoj ĝi fariĝas malrapide iomete malpli granda precipe tie. Ĉar la seksoj pro la vivokonduto pli kaj pli similiĝas - tio koncernas kaj la pozitivajn kaj la negativajn aspektojn - evidente ankaŭ la distanco ĉe la atingebla vivodaŭro malkreskas. Sed laŭ la opinio de plej multaj esploristoj ĝi neniam tute malaperos.

Esperanta Retradio

Yahya Kemal BEYATLI kaj lia poemo “Kvieta Ŝipo”

Yahya Kemal BEYATLI [Jahja Kemal Bejatli] (1884-1958) estas unu el la plej gravaj turkaj poetoj. Li estis poeto, verkisto, politikisto kaj diplomato. Lia poezio estis la ponto inter la malnova kaj nova stiloj de la turka poezio. En juna aĝo li forfuĝis al Parizo por fariĝi “Junaj Turkoj” aŭ “Novaj Turkoj” (Tiu estis grupo de intelektuloj, kiuj provis alporti demokratecon al la Osmana diktatoreco).



Kvankam ili ne sukcesis fari tion, ili kontribuis al la konstituciismo en la Osmana Imperio. Li poste apogis la liberigan militon kaj li eĉ farigis delegito de la turka registaro en la packonferenco en Lozano. Li poste fariĝis politikisto kaj laboris en turkaj ambasadejoj en diversaj landoj. Li dum sia vivo publikigis neniun libron sed post lia morto oni publikigis du librojn pri liaj verkoj “Kendi Gök Kubbe” (“Nia propra ĉielkupolo”) kaj “Eski Şiirin Rüzgarıyla” (“Kun la vento de la malnovstila poezio”).

Nun ni revenu al lia fama poemo “Kvieta Ŝipo”, por kiu ankaŭ estis komponita muziko.

Celile HIKMET [Ĝelile Hikmet] estis bela konata virino tra la tuta Istanbul. Ŝi estis la patrino de la fama komunista poeto Nazım Hikmet RAN. Dum la jaro 1916 ŝi havis gravajn problemojn kun sia edzo HIKMET. En tiu tempo Nazım HIKMET estis mararmea lernanto, kaj la turka gazetaro estis interesiĝema pri liaj poemoj. Yahya KEMAL estis dungita kiel instruisto de Nazım pri poezio kaj ili kunvenis en la hejmo de Celile en

Büyükkada [Bujukada] kiam Nazım alvenis hejmen en la semajnfinoj. Dum someroj ili loĝis en *Büyükkada* kaj dum vintroj ili loĝis en Istanbul.

Yahya KEMAL kaj Celile dum tiuj renkontiĝoj enamiĝis unu al la alia, sed Nazım komprenis iliajn aferojn kaj iam metis noton en la poŝto de la mantelo de Yahya KEMAL kun la averto “li venis kiel mia instruisto al tiu domo, sed vi ne povos veni kiel mia patro”. Celile poste eksedziĝis kun sia edzo

Hikmet tamen pro la noto de Nazım, Yahya KEMAL maltrankviliĝis kaj kvankam li ŝin tre multe amis, li ne povis decidi proponi geedziĝon al ŝi. Kaj tiu geedziĝo neniam okazis. Ili poste haltis vidi unu la alian kaj nek Celile, nek Yahya geedziĝis kun aliaj homoj.

Multaj jaroj pasis. Nazim HIKMET nun estis grava poeto kaj komunisto. La tiamaj registaroj malliberigis kaj suferigis lin dum longaj jaroj. Celile estis tre maljuna kaj ŝi eĉ perdis parton de sia vidkapablo. En sia maljuna aĝo ŝi estis zorganta kolekti subskribojn por la liberigo de Nazım. Iun tagon, ŝi estis sur Galata ponto, petante subskribojn el la preterpasantoj. Yahya KEMAL estis unu el ili kaj li rekonis ŝin sed li nek alproksimiĝis al ŝi, nek donis subskribon por Nazım. Li rapide malproksimiĝis el tiu loko.

Kiam Yahya KEMAL mortis, en liaj ŝrankoj aŭ labortabulo, inter la paperfolioj, oni trovis leterkovrilon en kiu estis du rozfolioj. En la leterkovrilo estis ankaŭ mallonga noto: "Ĉi tiu memoraĵo estas la du folioj de la rozo el la brusto de sankta virino, kiujn ŝi disŝiris kaj donis al mi en la 19-a de Aŭgusto 1930 je la 10:00-a horo kiam mi adiaŭis ŝin en Sirkeĝi Staciodomo. Ĉi tiujn du foliojn mi ĝiseterne konservos..." En tiu tago Yahya KEMAL komprenante ke ĉi tiu amo ne povus daŭri estis forlasanta Istanbulon por iri al Parizo por iom da tempo.

La poemo "Kvieta ŝipo"

Ĉiuj pensas, ke la temo de ĉi tiu poemo estas pri morto, sed la "deakriĝanta ŝipo el tiu ĉi ŝiphaveno por kiu neniu poŝtuko aŭ mano skuiĝas" estis verkita por ŝia granda amo kaj ĉagneriĝo kiam Celile estis foriranta el la

insulo *Büyükkada* por reveni al Istanbulo per ŝipo. Fakte le temo estis pri lia morto dum ĉi tiu momento.

Kvieta Ŝipo



*Se venis la tago por deankriĝi el tempo,
Al nekonata loko ŝipo ekveturas el ĉi tiu haveno.*

*Ĝi kviete survojiĝas kvazaŭ sen pasaĝeroj;
Dum ĝia ekveturo skuiĝas neniuj poŝtuko, nek manoj.*

*Malĝojas pro tiu vojaĝo restantoj en kajo,
Malsekaj okuloj rigardas dum tagoj al la horizonto.*

*Senhelpaj koroj! Nek tiu estas la ŝipo lasta!
Nek tiu estas de nia malĝoja vivo la funebro lasta!*

*En mondo amantoj kaj amatoj vane atendas;
Kvazaŭ ili neniel scias, ke amantoj neniam revenas.*

*Ŝajnas kontenta de sia loko la foririnto,
Multaj jaroj pasis; sed neniu revenis el sia vojaĝo.*

Esperanto Turkiye